

La Progreso

REDACTIE-
COMMISSIE:
G. P. DE BRUIN
TH. BUIS
G. J. DEGENKAMP

**STUDIEBLAD VAN DE FEDERATIE
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

F. FAULHABER
W. F. KRUIT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
H. VELTHOVE

REDACTIE-ADRES: G. J. DEGENKAMP, RIETSTRAAT 40, UTRECHT

Pli da akordo inter la Lingva-Komitatanoj! III.

Al tio, kion ni skribis, oni eble respondos, ke la Lingva-Komitatanoj individue ne reprezentas la Lingvan Komitaton, kiu sekve ne respondecas pri iliaj personaj opinioj kaj ke ne estas la tasko de la Lingva Komitato gvidi la evoluon de la lingvo. Tion ni konsentas. Sed la Lingva-Komitatanoj verkas lernolibrojn, gvidas kursojn, donas lingvajajn respondojn, tradukas kaj recenzas librojn, unuvorte: *agadas gvide* kaj ĉe tio ili disvastigas opiniojn, kiuj ne ĉiuj estas „universalaj”, pravigitaj de la Fundamento aŭ deciditaj de la Lingva Komitato aŭ la ĝenerala uzado. La fakto, ke ili estas anoj de la Lingva Komitato efikas al la publiko aŭtoritate kaj kvazaŭ oficialigas iliajn privatajn opiniojn. La „simpla” esperantisto kun ia respekto rilatas al la kompetenteco de tiuj, kiuj post sia nomo skribas la literojn *L. K.* kaj en lingva diskuto li volonte pravigas sin per la opinio de tiu aŭ alia Lingva-Komitatano. Sed li embarasiĝas, se li rimarkas, ke inter la Lingva-Komitatanoj ne regas akordo pri iu gramatika regulo, pri la signifo aŭ derivado de iu vorto, pri la lingva taŭgeco de iu traduko aŭ pri la stilo de ĵus aperinta verko. Li konfuziĝas, ĉar — kiel jam montriĝis i.a. el kelkaj ĉi antaŭe cititaj ekzemploj — ne ĉiukaze estas facile al li diferencigi devigan regulon de persona opinio pri lingva demando, kiun la tempo ankoraŭ ne solvis. Oni eĉ povas demandi, ĉu ĝenerale oni scias, ke ekzistas lingvaj demandoj, pri kiuj oni povas malsame opinii. Plej ofte oni akceptas tiun aŭ alian kompetentulan opinion, ne konante la opinion kontraŭan al ĝi¹⁾. Ĉi tiu situacio ne kontribuas al unueca uzado de la lingvo, nek al la prestiĝo de la Lingva Komitato, al kiu oni malprave atribuas la diversajn inter si kontraŭajn opiniojn de ĝiaj anoj.

Neĉesas ordo en tiu miksaĵo de reguloj kaj personaj konceptoj. Por akiri tiun ordon, ni konsilas:

- 1e. ke la Lingva-Komitatanoj akordiĝu inter si pri la rigora aplikado de diversaj gramatikaj kaj vortaraj reguloj, ĉu entenataj de la Fundamento, ĉu deciditaj de la Lingva Komitato kaj la praktika uzado.
- 2e. En literaturaj verkoj, lernolibroj aŭ aliaj prilingvaj eldonaĵoj la Lingva-Komitatanoj ne uzu aŭ instruu personajn konceptojn pri iu lingva problemo, ne klarigante, ke tiuj formoj aŭ konceptoj ne estas oficialaj. Krom tio ili aldonu eventualan kontraŭan opinion de aliaj kompetentuloj¹⁾. Tiel oni evitas, ke tiu, kiu havas oftan okazon kaj la bezonatajn rimedojn senĉese aŭdigi sian personan opinion, estu nur sekve de tio konsiderata kompetentega kaj pravega²⁾.

Por Komencantoj.

H. van Lier.

Opgave 45. Vertaal in het Esperanto:

Een avontuur van Nasreddin, de turkse Uilenspiegel.

Eens, toen Nasreddin na een langdurige ziekte voor het eerst weer in het openbare bad verscheen, vond hij daar personeel, dat hem niet kende. Daar hij eenvoudig gekleed was, werd hij weinig voorkomend behandeld. Nasreddin zei niets, doch wierp bij het heengaan 10 asper¹⁾ op tafel — een bedrag, dat zelfs door een aanzienlijke niet dikwijls gegeven werd.

Toen hij enige weken later verscheen, liepen alle badknechts zich het vuur uit de sloffen. Nasreddin echter legde bij het heengaan één asper op tafel en zei: „Dat is voor het bad van de vorige keer — toen heb ik voor nu betaald!”

(Uit: „Ben W.” 1930.)

¹⁾ Aspro.



Vertaling van opgave 37.

1. Li demandis, ĉu mi venos¹⁾ morgaŭ.

¹⁾ Niet: *venis*; li demandis: ĉu vi *venos* morgaŭ?

2. Mi supozis¹⁾, ke ankoraŭ pluvas²⁾.

¹⁾ Niet: *pensis*. ²⁾ Niet: *pluvis*, wat zou betekenen: dat het *geregend* had. Om de tijd in deze bijzin te bepalen, moet men die bijzin, evenals die van zin 1 in de directe rede overzetten, aldus: *Mi supozis: pluvas ankoraŭ*.

3. Vilhelmo¹⁾ petis²⁾ al mi, ĉu mi volas aĉeti por li tiun libron.

¹⁾ Let op: *v*; de *w* bestaat immers in Esperanto niet! ²⁾ Niet: *demandis*; hier is bedoeld *verzoeken* = *peti*. Het verschil is dit: op een *demando* verwacht men een *respondon*, op een *peto* een *plenumon* = inwilliging.

4. Mi vidis, ke vi pagas¹⁾ per guldeno.

¹⁾ Ook hier weer hetzelfde als in de vorige zinnen; in de directe rede luidt de zin: *Mi vidis: vi pagas*; men zou ook aldus kunnen verklaren: *Mi vidis vin paganta*, dus teg. tijd = *pagas*.

5. La instruisto aŭdis¹⁾, ke la knaboj helpas²⁾ unu (la) alian.

¹⁾ Niet: *aŭskultis* = luisteren, aanhoren, horen naar. ²⁾ De onderwijzer hoort hen elkander helpen, hoort, dat zij helpen = *helpas*; *helpis* zou hier betekenen: De onderwijzer hoorde, dat de jongens elkander *geholpen* hadden.

3e. „En lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan”. Ĉi tiu opinio de Zamenhof estu oficiale agnoskata; ĝi evitas senutilajn polemikojn, kia ekz. la „tiom-kiom-malsano” k.s.

4e. La ĝisnunaj lingvaj diskutpunktoj estu kolektataj en unu verko, en kiu trovu lokon ne nur unu, sed ĉiuj opinioj, kiuj sekve havos egalan atenton de la esperantistaro.

Ni ne pretendas, esti trovintaj pri tio la ĝustan solvon. Se oni konsentas, ke solvo de la nuna konfuzo estas necesa, ne gravas la maniero, laŭ kiu oni solvas ĝin. Tamen pri unu punkto ni insistas: *Pli da akordo inter la Lingva-Komitatanoj!*

F. F.

¹⁾ Prave Teo Jung kritikis en „Heroldo” la fakton, ke en „Plena Gramatiko” de Kalocsay kaj Warringhien oni povas legi pri la „ata-ita-problemo” nur la opinion de K. kaj W., ne la kontraŭan koncepton, kiu sendube estas same atentinda.

²⁾ Interesan ekzemplon pri tio ni trovis en „Nia organo” (Ned. Indio). En diskuto pri iu frazo, kiu tuŝas la ata-ita-problemon, la redaktoro skribis: „Laŭ mia opinio S-ro Cseh estas plene prava, Gorter kaj Kalocsay nelogikaj: *Sed tial ke la kompetentegulo en Esperanto, Kalocsay, okupas ĉi tiun vidpunkton, mi ne kuraĝis nomi la frazon de Gorter erara.*” (substrekis ni. F.F.)

6. Mi ne sciis, ke tiom (multe) da membroj ĉeestis¹⁾ la kunvenon.
¹⁾ Ook: *estas ĉeestintaj*; de samengestelde vorm is echter niet nodig.
7. La kursgvidanto deziris, ke oni liveru la taskojn ĝustatempe.
8. Se¹⁾ mi havus sufiĉe da mono, mi vizitus ĉiujn internaciajn kongresojn.
¹⁾ Niet: *kiam* = als, wanneer; hier is bedoeld: als, indien = *se*. *Kiam* zou men gebruiken, als men bedoelt, dat de tijd, dat men geld genoeg heeft zeker komen zal en men daar dan slechts op wacht.
9. Se mi havos sufiĉe da mono, mi iros la sekvontan¹⁾ jaron al Kopenhago²⁾.
¹⁾ Ook: *proksiman*. ²⁾ Natuurlijk mag men ook de vertaalde naam gebruiken: *Köbenhavn*, maar niet de nederlandse *Kopenhagen*.
10. Se ĉiuj homoj volus, milito jam ne eblus¹⁾.
¹⁾ Deze vorm is beter dan bijv. *ne venus plu* e.d.

Provalu la memoron!

Jac. Lem.

Opgave 46. Invuloefening.

(Daŭrigo.)

1. Eksidint—, la magiist— komenc— interparol— kun la patrin— de Aladin.
2. „(Beste zuster)”, li dir—, ne mir— (er over, dat) vi dum la tut— temp— de vi— (huwelijk) kun mi— frat— Mustafa (nooit) vid— min.”
3. „Mi antaŭ kvardek jar— forlas— (dit) land— kaj dum (die) temp— mi travojaĝ— Hind—, Persi—, Arabi—, Siri— kaj Egipti—, poste mi envetur— Afrik—, (waar) mi rest— loĝant—.
4. „Fine mi dezir— revid— mi— naskiĝland—, sed (nooit tevoren) (iets) (zo) aflikt— min (als) la eksci— pri la mort— de mi— frat—”.
5. La magiist—, rimarkant—, (dat) la vidvin— ekplor—, ŝanĝ— la konversaci— kaj turnant— (zich) al (haar) fil—, li demand— al (hem): „(Waarmede) vi okup— vin, knabo mia?”
6. Ĉe (deze) demand— la junul— klin— la kap— kaj tre (schaamde zich) (toen) (zijn) patrin— respond—: „Aladin est— tre mallaborem— bub—”.
7. (Zijn) patr— far— (al het mogelijke) por instru— al li (zijn) meti—, sed li ne sukces—.”
8. „Kaj post (zijn) mort—, li, spite al miaj admonoj, perd— la temp— en la stratoj.”
9. „Mi jam intencis forpel— (hem), por ke li zorg— pri si mem”.
10. La patrin— de Aladin ekploreg— kaj la magiist— dir—: „Vi agas tre malbon—, kara (neef); estas vi— dev— zorg— pri vi mem kaj pri vi— patrin—, vi klopod— gajn— vi— vivo-bezonaĝ—.”
11. „(Als) ne plaĉ— al vi lern— (enigerlei) meti—, mi volas aĉeti— por vi butik— kaj proviz— ĝin per diversspec— ŝtof— kaj tolaĝ—.”
12. (Aldus) vi pov— havig— al vi sufiĉe da bonfart— kaj vi pov— honest— viv—.

(Daŭrigota.)



Iuvulling der woorden van oefening 38.

1. Unu el, vivis, tajloro, kiu.
2. Estis, tiom, malriĉa, ke, povis, prizorgi, sian, familion, kiu, konsistis, lia, edzino, filo.
3. Lia, kies, senzorga, mallaboremulo (maldiligentulo).
4. Malobeis, siajn, gepatrojn, forlasis, mateno, hejmon, forrestis, tutan, tagon, ludi.
5. Kiam, aĝa, povi, lerni, metion, lia, patro, donis, okupon, sia, laborejo, instruis, uzi, kudrilon, post kiam, lia, patro, forlasis, laborejon, malaperis, reveni, tutan, tagon.
6. Punis, tio, povis, plibonigi, konduton, tiom, ĉagrenis, sian, patron, ke tiu, ĉe, malsaniĝis, mortis.
7. Post, tiam, fordonis, sia, mallaboremo.
8. Sia, klopodis, fari, ian, utilan, laboron.
9. Iun tagon (Iam), kiam, estis, ludanta, preteriris, fremdulo.
10. Tiu ĉi, fremdulo, sorĉisto, kiun, nomis, afrika, magiisto.
11. Observinte, sorĉisto, opiniis, ke, uzi, tiun ĉi, knabon.
12. Informiĝis, lia, nomo, kiam, sciis, ĉion, kion, deziris, scii, alpaŝis, diris, tajloro.
13. Respondis, knabo, mortis.
14. Aŭdinte, tiujn ĉi, vortojn, afrika, magiisto, ĉirkaŭprenis, kisis.
15. Diris, estas, via, onklo, via, kara, patro, mia, propa, frato, rekonis.
16. Tiam, donis, plenmanon, mono, diris, iru, via, patrino, salutu, mia, nomo, diru, ke, vizitos.

Men vraagt ons:

Is in de zin: *Ni nomas la hundon kaj katon dombestoj, nomas dombestoj* het gezegde?

Zeker! Dit gezede bestaat uit een werkwoord (*nomas*) en een naamwoordelijk deel (*dombestoj*). En omdat *dombestoj* de hoedanigheid uitdrukt van *hundo* en *kato* volgens de werking *nomi*, is *dombestoj* hier een *bepaling van gesteldheid*, die altijd een 1e naamval eist.

Is *nomi* een koppelwerkwoord? Zo ja, hoe dan de 4e naamval te verklaren in: *nomu lian nomon*?

Nomi is geen koppelwerkwoord, wel *nomigi* (*li nomiĝas Johano*). *Nomi* is een eenvoudig overgankelijk werkwoord evenals bijv. *titoli, krei, fari* enz. zodat een voorwerpsvorm na *nomi* even natuurlijk is als na een der genoemde werkw.

Kan *onverwachts* ook als eenvoudig *bijwoord* beschouwd worden in plaats van als een deelwoord, ook al, omdat na *onverwachts* geen komma geplaatst wordt zoals na een bijwoordelijke zin? Zo ja, zou dan als vertaling in plaats van *-inte* of *-ite* niet beter zijn *neatende*? *Sommige* woordenboeken geven als vertaling van *onverwachts* alleen *neatendite*.

In onze taal heeft *onverwachts* wel niet de gebruikelijke vorm van het deelwoord, zodat men het dan ook wel als een gewoon bijwoord beschouwen kan, evenals bijvoorbeeld *wanhopig*. De betekenis is echter of *niet verwachtende* (*verwacht hebbende*) of: *niet verwacht wordende* (*zijnde*), al naar het logisch onderwerp van de zin. Bijv.: *Onverwachts ontmoette ik hem* (hem niet verwacht hebbende) = *Neatendinte* *Onverwachts bezocht hij mij* (niet verwacht zijnde) = *Neatendite*.

Als een woordenboek naast *neatendite* geen andere vertaling geeft van *onverwachts*, is dit een tekortkoming van het boek.

Toch kan men, om de uitgang *-inte* of *-ite* vermijden, nog een andere vorm gebruiken, echter niet *neatende*, maar *senutende*, (= *sen atendo*), op dezelfde wijze gevormd als bijv. *senespere, sendorme, senparole, sensalute* enz.

Wat er aan haperde

Fouten van examen-candidaten.

G. P. de Bruin.

Candidaat K. vertaalde de zinnen:

Mijn broer schrijft mooier dan zijn vriend. Hebt gij dit boek gelezen? Het is zeer lezenswaard. Neen, ik las het slechts gedeeltelijk; het verveelde mij. Deze boeken kosten 5 gulden per stuk. Wat er ook gebeure, blijf rustig.

op de volgende wijze:

Mia frato skribas pli bela¹⁾ ol sia²⁾ amiko. Ĉu vi estas leginta³⁾ ĉi tiun libron? Ĝi estas tre legebla⁴⁾. Ne, mi legis ĝi⁵⁾ nur parte; ĝi enuis⁶⁾ min. Ĉi tiu⁷⁾ libroj kostas 5 guldenojn⁸⁾ po⁹⁾ ekzemplero. Kio ankaŭ⁹⁾ okazu¹⁰⁾, restu trankvile¹¹⁾.

1) Moet zijn: *bele*. *Mooi* zegt hoe iets gebeurt en is dus een bijwoord. Hoe eenvoudig dit ook lijkt, toch worden dergelijke fouten op de examens gemaakt.

2) Niet *sia*, maar *lia*. *Zijn vriend* is een bezitting van het onderwerp *mia frato*, heeft de candidaat misschien gedacht. Dit is wel zo, maar men gebruikt *sia* alleen, als er sprake is van een bezitting van het onderwerp *van dezelfde zin*! En dat is hier niet het geval! *Zijn vriend* is hier een deel van een andere zin, die compleet gemaakt aldus luidt: *dan zijn vriend schrijft*. Van deze zin is *zijn vriend* het onderwerp en moet dus vertaald worden met: *lia*. *Sia* kan nooit in een onderwerp voorkomen.

3) Beter: *legis*. Zie verklaring in vorig nummer van „La Progesanto.”

4) *Leginda*! De achtervoegsels *abl'* en *ind'* worden nog al eens met elkaar verwisseld.

5) Bepaling zonder voorzetsel, dus *ĝin*.

6) Enui = zich vervelen. In deze zin betekent *vervelen* eigenlijk: doen vervelen, d.i.: *enuigi*.

7) *Libroj* heeft de meervoudsuitgang *j*, dus moet *tiu* die ook hebben.

8) Het woordje *po* duidt aan, dat de prijs betrekking heeft op ieder exemplaar. Men zegt dan echter niet: *po ekzemplero*, maar: *Ĉi tiuj libroj kostas po kvin guldenoj*. Daar *po* als een voorzetsel wordt beschouwd, krijgt *guldenoj* geen *n*!

9) Niet: *ankaŭ*, maar: *ajn*!

10) Hoewel hier in het nederlands de aanvoegende wijs gebruikt wordt, is hier toch geen sprake van een wenselijkheid of noodzakelijkheid, maar van een mogelijke toekomstige gebeurtenis. Daarom in Esperanto: *okazos*.

11) *Trankvile* zegt hier niet iets van de handeling *resti*, maar van een (weggelaten) persoon. Men zou ook kunnen zeggen: *vi restu....* Het is duidelijk, dat *rustig* dan een bijvoeglijk naamwoord is, dus *trankvila*.



Opgave 47. Vertaal in het Esperanto:

1. ofschoon zij een mooie stem heeft, kan ze toch niet mooi zingen.
2. Als hij evenveel geld had, als zijn broer, dan zou hij het zeker beter besteden.
3. Dit glas is erg dun, het is zeer breekbaar.
4. St. Nicolaas is een eerbiedwaardige oude man met een witte baard en snor.
5. Alle aanwezigen waren ontroerd door deze droeve gebeurtenis.
6. Vader gaf ieder van ons een appel.
7. Waarheen gij ook gaat, wij zullen u niet vergeten.



Vertaling van opgave 39.

1. Mi ankoraŭ neniam renkontis iun, kiu povis mensogi tiom bone.
2. La patro kaj la patrino (of: la gepatroj) revenis hieraŭ je duono post la naŭa.
3. Dum nia promenado ni vidis kvinon da nekonataj birdoj.
4. Post tiaj malagrablaj spertoj, mi ne plu povas kredi liajn vortojn.
5. Tiuj, kiuj partoprenis (ĉeestis) ĉi tion, ne forgesos ĝin dum sia tuta vivo.
6. Se mi povus pagi tion (ĝin), mi irus ĉiu-semajne al la teatro.
7. Se mi pli enspezus nur unu guldenon semajne, mi povus vesti min pli bone.
8. Mi ne scias, kien li iris.
9. Je ĉi tiu adreso oni povas aĉeti ĉiajn aferojn (objektojn).
10. La ĉarpentisto ĉarpentas benkon por sia najbaro.

Men vraagt ons:

Vergun mij op te merken, dat de door u gegeven verklaring van *tiome*, *kiome* enz. in strijd is met de opvatting van Zamenhof in L.R., waar hij o.a. zegt: „... , kiam oni volas uzi la sencon de la vortoj *tia* kaj *tiel* en formo pli akcentita, mi trovas la vortojn *tiela* kaj *tiela* tre bonaj, ne sole permesindaj, sed eĉ rekomendindaj.”

Doch zelf waag ik het eveneens, het in deze met Zamenhof oneens te zijn, waarbij ik steun vind bij W. Lippmann in diens: „Dr. Zamenhofs Sprachliche Gutachten”, waarin hij die versterkende *e*-uitgang afkeurt, argumenterende, dat men ook andere woorden niet versterkt door toevoeging (verdubbeling) van de uitgang (*sopiroo* en *belaa* in plaats van *sopiro* en *bela*). Maar geldt deze redenering niet evenzeer voor de door u geoorloofde vormen *plie* en *plue*? Waarom zouden *pli* en *plu* ongewijzigd als vertalingen van *bovendien* en *daarenboven* niet te verkiezen zijn boven *plie* en *plue*? En vanwaar uw regel, dat die twee bijwoorden door toevoeging van de *e* een gewijzigde betekenis zouden krijgen?

We zijn het in alle opzichten met elkaar eens, d.w.z. W. Lippmann, u en wij, en strikt logisch opgevat kan geen enkel afgeleid bijwoord door toevoeging van de *e* een gewijzigde betekenis *krijgen*, dus o.i. evenmin *pli* en *plu*. Zelfs zouden ook wij *pli* en *plu* liever dan *plie* en *plue* zien als vertalingen voor *bovendien* en *daarenboven*. Doch de practijk heeft het enigszins anders gewild. In bepaalde gevallen toch (o.a. ook de uitgang *eca* in plaats van *a* in bijv. *hejmeca* en *respondeca*) wijzigt weliswaar niet het achtervoegsel de betekenis van het woord, maar vraagt de practijk om een gewijzigde vorm voor een schakering van betekenis en kiest dan, bij gebrek aan ander of beter, een uitgang, die die rol vervullen moet, buiten de logica om. Zo zijn blijkbaar ook *plie* en *plue* in gebruik gekomen, waar men daarmee geen eenvoudig bijwoord bedoelt als in: *li iras plu* (meer, verder), maar een voegwoordelijk bijwoord als in: *kaj plue li iras* (en bovendien gaat hij). Om deze reden alleen achten wij die *e*-uitgang geoorloofd, hoewel we haar niet zullen aanbevelen.

Practisch handelt men dus met die bijwoorden evenals met sommige voegwoordelijke bijwoorden van voorzetsels afgeleid: *krom* - *krome*, *post* - *poste*, *anstataŭ* - *anstataŭe*, *pli* - *plie*, *plu* - *plue*, en waar *krome* betekent *krom tio*, *kan*, niet moet *plie* betekenen *pli ol tio*.

O.i. is echter de vorm *krome* te verkiezen boven *plie* of *plue*.

Handleiding bij het vertalen.

F. Faulhaber.

Tekeningen van Svitberto.

De betekenis van een woord. (Vervolg.)

16. *De spreker besloot zijn rede met een aanhaling uit „Vortoj de k-do Lanti.”*

Voor *besluiten* beschikken we over drie vertalingen: *konkludi*, *decidi* en *fini*, die echter niet door elkaar gebruikt kunnen worden, want zij hebben elk een andere betekenis.

Konkludi is: Tiri per rezono logikajn konsekvencojn el argumentoj, principoj aŭ faktoj; dus: *een gevolgtrekking maken, concluderen*, b.v. El tio, kion ni scias, ni povas konklidi, ke... (P.V.).

Decidi = Definitive fiksi post pripenso opinion, juĝon aŭ volon, dus: *een besluit nemen*, b.v.: Oni decidis organizi kurson. (P.V.)

Fini = 1. Ĉesi fari, ne daŭrigi plue ian agadon. 2. Tutfari, plenumi, konduki ian aferon ĝis la punkto aŭ momento, kiam ĝi estas kompleta kaj ĉesas, dus: *eindigen*, b.v.: Mi finis mian laboron. (P.V.)

Het woord *besluiten* heeft dus drie betekenissen: *een gevolgtrekking maken, een besluit nemen* en *eindigen*. Het is duidelijk dat wij in bovenstaand voorbeeld de laatste betekenis moeten weergeven. We kiezen dus: *fini*.

17. *Gisteren hebben de japannezen een aanval gedaan op Kanton; er zouden reeds vele chinezen gewond zijn.*

Zouden heeft hier niets te maken met de voorwaardelijke wijs, zoals in: Als de kat ziek was, *zou* ze niet eten = Se la kato estus malsana, ĝi ne *manĝus*, en ook niet met de verleden toekomstige tijd, zoals in: Zij schreef mij, dat zij mij morgen *zou* bezoeken = Si skribis al mi, ke ŝi morgaŭ vizitos min.

Hier heeft *zouden* de betekenis van „naar men zegt”, „naar wij hebben vernomen” e. d. We vertalen dus:

Ni eksciis, ke jam multaj ĉinoj estas vunditaj; of: Laŭdire (laŭinforme e. d.) multaj ĉinoj estas vunditaj.

Dezelfde betekenis heeft in zulke gevallen ook *moeten*:

Er *moeten* reeds vele chinezen gewond zijn.

Zouden en *moeten* hebben hier dus niets gemeen met *-us* en *devi*. Over de verscheidenheid van betekenissen van verschillende voorzetsels hebben onze gewone leerboeken reeds een en ander verteld¹⁾. Daarover behoeven we hier dus niet te spreken.

In elk van de volgende zinnen, die weliswaar zijn „gezocht”, doch niet onmogelijk zijn, zien we een en hetzelfde woord tweemaal gebruikt, telkens in een andere betekenis:

18. *De zin¹⁾ van die zin²⁾ begrijp ik niet.*

¹⁾ senco. ²⁾ frazo.

19. *Als lid van de hervormde kerk¹⁾ ging zij Zondags naar de kerk²⁾.*

¹⁾ eklezio. ²⁾ preĝejo.

20. *Het schijnt¹⁾ dat de zon schijnt²⁾.*

¹⁾ ŝajnas. ²⁾ brilas.

21. *Hij vroeg de raad¹⁾ om raad²⁾.*

¹⁾ konsilantaro. ²⁾ konsilo.

¹⁾ Een uitgebreide verhandeling over de voorzetsels vindt men in *De Voorzetsels in het Nederlands en in Esperanto* door G. J. Degenkamp. Uitgave van de Libro-Servo F.L.E. Prijs f 1.35

22. *In zo'n leven¹⁾ kan ik niet leven²⁾!*

¹⁾ bruo. ²⁾ vivi.

23. *'t Is haar schuld¹⁾, dat zijn schuld zo opgelopen is²⁾.*

¹⁾ kulpo. ²⁾ ŝuldó.

24. *De regering¹⁾ van die regering²⁾ duurde vier jaar.*

¹⁾ regado. ²⁾ registaro.

25. *Je hebt een hoop geld verdiend¹⁾, maar of je het verdiend²⁾ hebt, is de vraag!*

¹⁾ gajnis. ²⁾ meritis.

26. *De voorzitter noteerde in zijn agenda¹⁾ de agenda²⁾ van de volgende bestuursvergadering.*

¹⁾ agendo. ²⁾ tagordo.

27. *Artikel¹⁾ 4 van de overeenkomst zegt, dat de artikelen²⁾ binnen 14 dagen geleverd moeten worden.*

¹⁾ paragrafo. ²⁾ artikloj:



„Staart naar buiten.”

in de tekst van het stuk, kijkt u maar”. En de criticus las: *Veldwachter komt op. Staart naar buiten.*

Men vraagt ons:

Is het gebruik van *lia* goed in de volgende zin: *Li acetis la librojn bezonatajn por lia studado?* Zo ja, hoe dan in de zin aan te geven, als het onderwerp de boeken kocht voor een ander?

De vertaling is correct en uw eraan toegevoegde verklaring evenzeer. In het deelwoord *bezonatajn* ligt een logisch onderwerp besloten (*li*), zodat dit zinsdeel volledig zou luiden: *kiuj (la libroj) estas bezonataj por lia studado* (niet bezit van onderwerp *libroj*, maar van *li*).

Als de boeken voor een ander bestemd waren, zou dit op de een of andere wijze in de zin moeten worden aangegeven. Is die persoon met name genoemd, bijv. J., dan: . . . *por la studado de J.*; zo niet, dan kan men ook met *ties studado* volstaan. En is een vrouw of meervoud bedoeld, dan heft *ŝia* of *ilia* alle misverstand op.

Esperanto en la ĉiutaga vivo.

H. Velthove.

K.: Portier, ik kom hier een benzinemotor repareren.

Portier: Oh, van de firma „Riparĉion”, niet? Loop maar door naar het kantoortje van den bedrijfsleider; u weet de weg.

K.: Heintje, blijf jij maar even buiten wachten....!

Morgen, juffrouw, is de chef hier aanwezig?

Juffr.: Nee, hij is net een paar minuten geleden het ketelhuis ingegaan, maar hij komt zo terug om koffie te drinken. Wacht u hier maar even. Neemt u hier zo lang maar even plaats....!

Bedrijfsl.: Oh, bent u er al?! Dan zullen we maar gauw naar de staker toegaan.... Nee, die kant op. Hij staat in dat bijgebouwtje.... Zo, hebt u uw oude hulpje meegenomen?

K.: Ja. Hij weet de weg hier; daar kan je gemak van hebben, niet waar....? Waar dient dat ding eigenlijk voor? Ik heb 'em hier nog nooit eerder gezien.

Bedr.: Ja, hier de deur door. — Nee, we hebben 'em ook nog pas. Tweedehands gekocht. Hij moet die pomp drijven. Toen we 'em overnamen, deed ie 't goed, maar gisteren gaf ie in eens een doffe klap en stil stond ie; geen beweging meer in te krijgen. En nu aan u de taak, dat ding weer op gang te krijgen. Als u 'em uit elkaar hebt, hoor ik wel wat de oorzaak is. Tot straks!

Pordisto, mi venis por ripari ĉi tie benzinmotoron.

Ho, sendis vin la firmo „Riparĉion”, ĉu ne? Vi pasu kaj iru [vi daŭrigu vian vojon] al la kontoro de la funkciestro; vi ja scias la vojon.

Henĉjo, vi atendu momenton ekstere!.....

'nan matenon, fraŭlino, ĉu la ĉefo ĉeestas (tie ĉi)?

Ne, li ĵus antaŭ kelke da minutoj eniris la kaldronejon, sed li' tuj revenos por trinki kafon. Vi atendetu [atendu kelke da momentoj] ĉi tie. Dume vi eksidu tien ĝis lia reveno!....

Bone, do vi jam venis! Ni do tuj iru al la strikanto....

Ne, laŭ (en) tiu direkto. Ĝi staras en tiu malgranda flanka konstruaĵo [domo] Ha, vin akompanas via (konata de ni) asistanto!

Jes, li scias la vojon ĉi tie; tio povos oportuni al mi, ĉu ne?..

....Kiacele oni fakte aplikas tiun maŝinon? Antaŭe mi neniam vidis ĝin ĉi tie.

- Jen, tra tiun pordon (vi iru) - Tio ĝustas [akordas kun la realo]. Antaŭ nelonge ni ekposedis ĝin [havigis ĝin al ni]. (Ni) aĉetis ĝin nenova. Ĝi devas turni [movi, funkciigi] tiun pumpilon. Kiam ni aĉetis ĝin, ĝi bone funkciis, sed hieraŭ ĝi subite aŭdigis obtuzan ekbruon kaj jen....senmova ĝi estis; (ĝi estis) ne plu movebla. Kaj nun vi havu la taskon refunkciigi la aparaton. Kiam vi estos malmuntinta ĝin, vi sciigu al mi la kaŭzon [informu min pri la kaŭzo]. Gis poste!



Por Progresantoj.

Opgave 48. Vertaal in het Esperanto:

Wat zijn vader deed. (Slot.)

Ik stond dus op met de bedoeling in de omtrek hulp te halen, doch de bruoit raadde mijn bedoelingen en blafte mij toe: „Blijf toch zitten, waarde vriend, waartoe is het nodig dat ge mij noodzaakt het voorbeeld van mijn vader te volgen?” Wat kon ik anders doen dan blijven zitten en toekijken, hoe Schmidt, door zijn nieuwen gast opgejaagd, steeds maar nieuwe hoeveelheden voedsel opdiende, die in geweldig tempo werden verorberd. Ieder ogenblik scheen het, dat de grote, ruwe handen van den reus mes en vork, waarvan hij zich bediende, zouden verbrijzelen.

„Je legt meer eer in met je eten, dan met je uiterlijk, waarde heer!” ontving Schmidt ten slotte als compliment, „maar het zou me al heel erg verwonderen als je geen lekker wijntje onder de kurk had”. Toen de waard, wiens gierigheid zijn angst scheen te zullen overtreffen, even aarzelde, werd hem toegebulderd: „En gauw wat met die wijn, of is het soms nodig, dat ik je opnieuw aan mijn vader herinner!”

Tenslotte was de geweldenaar verzadigd; hij stond op en begaf zich naar de deur. Op dat ogenblik meende ik een wat vriendelijker trek op het rode gezicht van den onwelkomen gast te bespeuren en toch wel nieuwsgierig welk lot ons boven het hoofd had gehangen, waagde ik het te vragen: „Vertel mij eens, wat deed uw vader dan toch wel, toen men hem niet te eten gaf?”

Tot mijn verbazing begon de reus daverend te lachen. Hij legde een hand ter grootte van een schapenbout op mijn schouder en zei minzaam: „Maar beste man, dat is toch niet zo moeilijk te raden! De arme kerel ging met een lege maag de kou weer in!!!”



Vertaling van opgave 40.

Kion faris lia patro.

En¹⁾ normalaj²⁾ cirkonstancoj mi certe ne ekhavirus la ideon³⁾ eniri la izole situantan⁴⁾ hoteleton „La Ruĝa Rajdisto”⁵⁾, ĉar Schmidt, la malgranda posedanto⁶⁾, estis konata⁷⁾ kiel parolema⁸⁾ kaj kalumniema⁹⁾, kaj krom tio¹⁰⁾ li postulis¹¹⁾ ekstreme altajn prezojn por siaj manĝaĵoj, kiujn li laŭkutime tamen¹²⁾ sciis bonege prepari¹³⁾. Li do ne estis agrabla homo, sed longa vojo¹⁴⁾ tra soleca¹⁵⁾ regiono kuŝis antaŭ mi kaj la akra malvarmo akompanata¹⁶⁾ de froste tranĉaj¹⁷⁾ neĝblovoj¹⁸⁾ kvazaŭ¹⁹⁾ pelis min en la direkto al²⁰⁾ „La Ruĝa Rajdisto”, kie min laŭscie²¹⁾ atendas²²⁾ agrable kraketanta²³⁾ fajro kaj bona manĝo.

La malgranda hejmeĉa²⁴⁾ gastoĉambro²⁵⁾ estis tute senhoma²⁶⁾, kion mi bedaŭris, ĉar pro tio²⁷⁾ mi estis viktimo²⁸⁾ de la parolemo²⁹⁾ de³⁰⁾ malgranda Schmidt, kiu tuj³¹⁾ superŝutis min per siaj tradiciaj³²⁾ plendoj pri pasantaj³³⁾ almozuloj kaj vagistoj³⁴⁾. Kiam fine mi povis komenci³⁵⁾ la (re)fortigan³⁶⁾ manĝon servitan al mi³⁷⁾, Schmidt, publikiginte³⁸⁾ la malvirtojn³⁹⁾ de la nemultaj najbaroj⁴⁰⁾ 41) estis ĉe la fino de siaj paroloj⁴²⁾. Nun komencis regi vere agrabla sfero⁴³⁾: aŭdeblis⁴⁴⁾ nur la kraketado de la fajro kaj la blovbruo⁴⁵⁾ de la neĝo ekstere⁴⁶⁾.

Subite la kvieton⁴⁷⁾ rompis⁴⁸⁾ bruo sur⁴⁹⁾ la pordo, kiu tuj poste estis puŝe malfermata⁵⁰⁾. Giganta figuro⁵¹⁾ aperis⁵²⁾ en la pordaper-turon⁵³⁾ kaj, deskuinte de si la neĝon, eniris la gastoĉambron.

(Daŭrigota.)

OPMERKINGEN

- 1) Ook: *sub*; *sub* heeft dan een fig. betekenis, evenals in: *sub tiu kondiĉo*, *sub ies ordonoj*; minder goed is *dum*; niet: *inter* = tussen.
- 2) Ook: *ordinaraj*.
- 3) Ongewoon, maar goed is *ekideus*; ook: *ne venus en mian kapon la ideo* of: *estigus en mi la ideo*; minder juist: *ekpensus*; doch niet de overbodige samengestelde vorm: *estus ekspensinta*. De voorwaardelijke wijs is in alle vormen beslist nodig, omdat deze in de zin ligt besloten.
- 4) Ook: *izolita* of: *soleca*; niet: *fora* = ver verwijderd, wat niet hetzelfde is als *afgelegen*.
- 5) Of: *Kavaliro*.
- 6) Geen fout is: *malgrandulo*, maar als de naam genoemd is, volstaat men gewoonlijk met het eenvoudig bijv. naamwoord. Ook: *mastro*.
- 7) Niet: *estas*. De vertelling is in de verleden tijd. Te sterk is *famiĝi*.
- 8) Ook: *babilema*. Men schrijve niet: *parol— kaj kalumniema*; een dergelijke afkorting is ongebruikelijk, tenminste in woorden met een gelijkkluidend achtervoegsel.
- 9) Niet: *kalumniante* = aan het lasteren noch: *kalumnia*; dit laatste past wel in: *kalumnia parolo, letero, akuzo k.s.*
- 10) Ook: *krome* of: *plie*.
- 11) Ook: *tarifis siajn mangaĵojn altprezaj*. Een meer woordelijke vertaling kan ook goed zijn, bijv.: *liaj* (niet: *siaj*!) *manĝ(aĵ)oj estis treege karaj (multekostaj)*.
- 12) Niet: *cetere*, wat het contrast hier benodigd niet weergeeft; met een geringe wijziging in de zin is daarom wel *kvankam* goed, doch *malgraŭ ĉio* is weer te sterk.
- 13) Of: *kvankam li kutime bonege preparis ilin*. Minder goed is *pretigi*.
- 14) Alle andere vertalingen zijn minder goed, hoewel niet beslist foutief te noemen. Sommigen gebruikten *vojon* als voorwerpsvorm na *iri* of *vojaĝi*; zulk een vorm is wel gewoonte geworden, hoewel grammaticaal niet te verdedigen, daar *iri* niet overgankelijk is.
- 15) *Senhoma* is niet juist, want wanneer er zich daar enkele mensen bevinden, is de streek niet meer *senhoma*, doch blijft toch *eenzaam*.
- 16) Ook: *kune kun*; minder juist zijn *en kunlaboro kun* en: *kunlaborante kun*.
- 17) Ook: *tranĉaj* of: *tranĉantaj*.
- 18) Niet: *neĝopuŝoj*, noch: *ekneĝoj*.
- 19) Niet: *ŝajne* = ogenschijnlijk, schijnbaar.
- 20) Niet: *en la direkto de*; *direkto* kan ook nooit een richting--n krijgen, omdat een richting geen plaats is, waarheen men gaat, doch een denkbeeldige lijn, waarlangs men gaat.
- 21) Ook wel: *laŭ mia sperto*; *kie mi sciis* is te woordelijk; *konjektis* geeft de betekenis niet goed weer.
- 22) Geen verleden of toekomstige tijd; de betekenis is: *mi sciis, ke atendas*.
- 23) Niet: *ardetan*; wel kan: *ardetantan*. Er is sprake van een werking, niet van een hoedanigheid.
- 24) Ook wel: *intima*; niet: *societema*, wat men wel zou kunnen gebruiken, als er een gezelschap aanwezig was.
- 25) Ook: *konsumejo*; niet *drinkejo* = kroeg, café.
- 26) Ook: *malplena* of: *trovigis neniu gasto*. *Forlasita* is minder goed; dit zou men gebruiken, als de gasten juist vertrokken waren.
- 27) Niet: *nun*; *nu* betekent hier beslist *daarvoor*.
- 28) De woordelijke vertaling *estis transdonita* is minder geschikt; doch *estas transdonata* is foutief; het zou betekenen *wordt overgeleverd*. Niet: *toleri*.
- 29) Niet: *parolemeco*. De uitgang *emeco* is verouderd en onlogisch.
- 30) Het lidwoord voor een eigennaam is foutief of zeer ongewenst.
- 31) *Senprokraste* is te sterk. Niet: *transversis* = overgoot.
- 32) Ook: *kutimaj*.
- 33) *Preterpasantaj* is onnodig; *pasi* geeft de betekenis al voldoende weer.
- 34) Ook: *vaguloj*; *vagabondoj* is juist, maar geen officieel woord.
- 35) Niet: *komenci al*; dit is een nederlandisme.
- 36) Beter dan: *nutran*.

- 37) Ook: *estis metita antaŭ mi*; niet: *metatu = werd gezet*.
- 38) Niet: *publikite*; een lijdend deelwoord kan geen lijdend voorwerp hebben. Men kan ook wel *publikinte* gebruiken, door aan *publiki* de betekenis van publiceren te geven, maar deze vorm is niet aan te bevelen, omdat men, door haar consequent toe te passen, voor andere moeilijkheden komt. *Doninte al la publikeco* kan wel.
- 39) Niet: *netaŭgajojn*; dit is te concreet.
- 40) Ook wel: *ĉirkaŭloĝantoj*; niet: *kvartalanoj*; *kvartalo = stadswijk*.
- 41) Het woordje *ook* mag beslist niet vertaald worden. Zelfs in de nederlandse zin valt het als onlogisch op.
- 42) Ook: *estis finparolinta*.
- 43) Ook: *iĝis agrable* of: *estigis agrabla sfero*.
- 44) Ook: *oni aŭdis nur*. Wel kan: *estis ĉio, kion oni aŭdis*, maar niet: *la nuraj, kion...*; na *nuraj* zou men immers *kiujn* moeten gebruiken en dan valt de fout direct op.
- 45) Niet: *muĝetadon*; *muĝi = loeien*, bijv. van storm.
- 46) Niet: *de ekstere* wat men gebruikt bijv. na *veni (veni de ekstere)*.
- 47) Ook: *silenton*; niet: *trankvilon*, wat een meer innerlijke betekenis heeft.
- 48) Niet: *interrompi*, want de rust *blijft* voorlopig verbroken. Ook de lijdende vorm is goed (*estis rompata*), maar minder mooi. Ook *ĝeni* is te gebruiken.
- 49) Niet: *al = naar*, noch: *apud = nabij*; wel: *ĉe*.
- 50) Niet: *malfermiĝis*, want de werking geschiedt duidelijk door een persoon. Ook: *puŝmalfermata*, maar niet de omgekeerde vorm: *malfermpuŝata*, die een woordelijke vertaling is van ons *openstoten*.
- 51) Niet: *staturo = lichaamsbouw, postuur*.
- 52) Of: *montris sin*.
- 53) Niet: *pordotruo = gat in of van een deur*. *Pordo* alleen zou al voldoende zijn, omdat *pordo* niet alleen de eigenlijke deur is, maar ook de deuropening; doch in deze zin is na *pordo pordaperturo* wel gewenst.

Esperanto 50-jara.

Vera majstro en tradukado, poeto, sed ankaŭ vera gramatikisto estas K. Kalocsay. Lia gramatike dialektika talento estas mirige vasta, kvankam plurajn liajn koncentojn pri gramatiko ni ne povas akcepti. Estas tasko de ĉiu talenta gramatikisto laŭeble solvi ĝisnunajn dubajn punktojn en la gramatiko, sed tio ne signifas, ke per individua solvo iu problemo estas nepre devige por ĉiuj solvita. Eĉ la plej genia solvo de duba afero ne havigas la rajton nomi ĉiujn aliajn solvojn eraraj. Ĉe tio ni pensas i.a. pri la decido de Kalocsay koncerne modon post *kvazaŭ*, pri la *a*-finaĵo por virinaj propraj nomoj kaj pri lia ideo „inversa vortefiko”, eltrovo por nomi korrektaĵojn tiajn formojn en vortfarado, kiajn oni ĝis nun rigardis nepre kontraŭregulaj. Tiujn ĉi kaj aliajn ideojn Kalocsay malvolvis en sia „Lingvo-Stilo-Formo” kaj en „Plena Gramatiko”, interesege dokumentaro, sed nepre malakceptinda leĝaro.

La plej konataj originaloj de Kalocsay estas „Mondo kaj Koro”, „Rimportretoj” kaj „Streĉita Kordo” kaj liaj plej bonaj tradukoj „Tragedio de l' Homo” de Madach, „Eterna Bukedo” kaj „Infero” de Dante, kiu lasta estas vera majstroverko.

En si mem la verkoj de Kalocsay ne prezentas stilon absolute originalan, nek lingvaĵon tute novan. Li mem konfesas, ke la „budapesta skolo” kies animo li estas, „deziras daŭrigi tie, kie Zamenhof kaj Grabowski delasis”, rigardante „la lingvon vivanta”, salutante „ĉiujn ĝiajn apartaĵojn, nelogikaĵojn, idiotismojn... kiel signon de memstara vivo”. Sed en vero Kalocsay daŭrigas la laboron pli de Grabowski ol de Zamenhof, kaj eĉ en grado multe pli ekstrema ol Grabowski mem. Krom tio ekzistas tre granda diferenco inter lia

propra intence elcentra lingouzado kaj liaj juĝoj recenze donitaj pri verkoj, en kiuj svarmas eraroj faritaj pro nekompetenteco de la aŭtoroj aŭ tradukintoj mem.

Inter la modernaj verkoj iom elstaras la stilo kaj lingvaĵo de W. Bailey en „Petrolo” de Upton Sinclair, ĝuste pro la fakto, ke ne la stilo havas elstarajn karakterizaĵojn, sed pro tio, ke la aŭtoro precizege klopodas apliki la formojn de Zamenhof mem uzitajn. Bailey ne lasas sin gvidi de modernaj konceptoj, nek de plejeble precize ellaboritaj logikaj teorioj. Li simple daŭrigas la stilon de Zamenhof, per tio donante vere purajn modelojn, sed samokaze kaŭzante ian stabiligon en la evoluo de la lingvo. Per si mem tio lasta eble estas iomete riproĉinda; en la tuto de la evoluo tio estas faktoro utiliga, ĉar tio iom bremsas aliies klopodojn evoluigi la lingvon per formoj tro artefaritaj kaj tro akcelaj.

Nekutime pezan stilon oni povas konstati en kelkaj S.A.T.-eldonoj. Kvankam en iuj tiun stilon postulas temoj kun scienca, ekonomia aŭ simala karaktero, en aliaj ĝi estas senbezone peza.

Ĉe la fino de tiu ĉi ĉapitro ni menciuj, ke, krom la signifoplenaj stilnuancoj ĉi supre skizitaj, aperis diversaj libroj kun negranda aŭ tute sen ia literatura valoro kun stilo nur pro tio rimarkinda, ke iliaj, cetere en Esperantio preskaŭ nekonataj, tradukintoj aplikas en ili fraztordiĝojn, kripligitajn vortkonstruojn aŭ tro nekutimajn gramatikajn formojn, kiel: nacikutiman ellason de l' subjekto (ekz.: *venos tuj* anstataŭ: *mi venos tuj*), en Esperanto nepermeseban, ĉar la Esperantaj verboformoj ne influas la persono kiel en aliaj lingvoj — nekutiman antaŭenmeton de komplemento kun la prepozicio *al* (*mi al vi diras*) — tro- kaj misuzadon de *po* — nacikutiman uzadon de *vi* kaj *ni* kun la senco de *oni* — ellason de demanda vorto en frazo demanda (*vi devas iri?*) — trouzadon de malsimplaj verboformoj, kaj precipe laŭvortan tradukadon.

Ĉar tiaj nekutimaĵoj neniel influas le evoluon de la lingvo, ni ne menciuj la koncernatajn librojn, nek iliajn tradukintojn. Nur por kompletigi nian superrigardon ni menciis kelke da tiaj strangaĵoj, kiaj evidente originas parte el nekompetenteco de tradukintoj, parte el iliaj deziroj prezenti ion novan ĝis nun neviditan kaj parte ankaŭ el klopodoj intencaj aŭ senintencaj kiom eble plej ĝuste transmeti la originalajn formojn, per kio la kaŝita senco en la frazo ofte perdiĝas au kripliĝas.

Diversnacieco

Kun fiero ni deklaras verve,
Ke l'ideo regas senrezerve.
Tamen, ni permesas sen skrupuloj,
Ke ĝin fuŝu naciecmakuloj.

La konstantaj klopodoj puŝi la lingvon en direkto plejeble logika ne povis ne elvoki reakcion. Strange nur estas, ke tiu reakcio estas konstatebla ne ĉe literaturistoj, kiuj el principo preferas formojn naciajn super logikaj kaj laŭ tiu principo mem agas tiel. Oni ĝuste povis konstati inversan evoluon de l' afero: Malgraŭ la zorgaj penadoj de logikemuloj la Esperantan literaturon enpenetris konstante pli kaj pli multe da libroj el vidpunkto logika riproĉindaj. La recenzado ĝenerale ne estis severa por senindulge kondamni tiujn librojn, pro kio ili estis legataj same ĝenerale kiel verkoj vere bonaj. Kaj el tiu fakto rezultis la stranga, iel eĉ kontraŭnatura fenomeno, ke pli

kaj pli multaj literaturistoj, ne volantaj nomi grandan kvanton de nia literaturo laŭvalore dubinda aŭ eĉ malbona, klopodis trovi en faritaj eraroj kaj kritikindaĵoj tamen ion bonan. Alivorte: ili klopodis defendi la malbonon, serĉante por ĝi akcepteblan bazon. Tiun bazon ili prezentis en la aserto, ke naciaj parolturnoj kaj gramatikaj formoj esence naciaj reprezentas en Esperanto pliriĉigon. Laŭ tiu ilia opinio oni ne klopodu ekstermi tiajn formojn, sed male, ili estu bonvenaj!

En gazetartikoloj oni komencis averti kontraŭ tro skrupule logika aplikado de la lingvaj reguloj, asertante, ke tio ĝenerale farus la aspekton de la lingvo rigida kaj monotona. Kelkaj aŭtoroj eĉ kuragis malkaŝe diri, ke ili preferas efektive mallogikajn naciajn formojn super formoj logikaj.

Grava faktoro en la historio de Esperanto estis la fondo de la eldonejo „Literatura Mondo”, ĉar efektive la malvolvido de la Esperanta literaturo bezonis koncentriĝon de fortoj. Antaŭaj kaj ankoraŭ ekzistantaj entreprenoj, inter kiuj „Heroldo de Esperanto”, tiudirekte jam efikis utile, sed neniu el ili sukcesis tiom grandskale entrepreni la eldonadon ekskluzive de literaturaĵoj.

Ni povus esti ĉiurilate dankaj al L. M., se ne ekzistus tri faktoroj, kiuj multe moderigas nian ĝojon pri la jam atingitaj sukcesoj.

Unue, la komerca karaktero de L.M. ofte superombas ĝian literaturan valoron.

Due, same kiel iagrade jam „Heroldo de Esperanto” kaj la Internacia Cseh-Instituto, nun ankaŭ L.M. pro siaj tre kompetentaj kunlaborantoj prenas sur sin aŭtoritatan pozicion, kiun neniu privata esperantisto, nek iu ajn Esperanto-institucio, escepte de L.K., rajtas. Ekster la fundamente fiksitaj lingvaj reguloj ja ekzistas en Esperanto diversaj lingvaj problemoj ne ĝenerale solvitaj. Tiujn ĉi problemojn ĉiu kompetentulo klopodas solvi, kvankam ne rajtante deklari sian solvon deviga aŭ valida ankaŭ por aliaj esperantistoj. Sed estas facile komprenebla fakto, ke influhava esperantisto aŭ institucio eĉ bonintence metas sin mem super ĉi tiun liberalan starpunkton, klopodante trudi siajn konceptojn al la esperantista popolo, dume forgesante, ke ekster tiuj konceptoj ekzistas ankoraŭ aliaj opinioj. Pro tiu ĉi fakto oni jam sprite komparis L.M. kun insulo, kies loĝantoj vivas same izolitaj el la ekstera mondo.

La lingvaj konceptoj de L.M. kolektiĝis en la verkon „Plena Gramatiko” de Kalocsay kaj Warringhien, kiuj pro sia profunda ellaboro de pluraj lingvaj problemoj meritas grandan respekton, sed kies solvoj prezentitaj tiaforme tro pretendas aŭtoritaton, kiun ĝi ne povas havi.

Trie kaj fine: malgraŭ la lingvaj konceptoj esprimitaj en P.G., L.M. tamen aplikas iasence tro liberalan starpunkton koncerne la lingvan kvaliton de siaj eldonoj. Krom pluraj lingve kaj stile bonegaj kaj modelaj verkoj aperis ĉe L.M. ankaŭ aliaj libroj, kies lingva kvalito estas eĉ malbona, ĉar iliaj tradukintoj tro libere aplikis la lingvajn regulojn, enkondukante plurajn formojn esence naciajn, per kio ili, anstataŭ pliriĉigi la literaturan lingvan, multrilate makulis ĝian purecon.

La eldonoj de L.M. estas tro multaj, ol ke ni povus dediĉi al kelkaj el ili apartan konsideron. Ni nur metu unu kontraŭ alian du tradukojn laŭ lingva kvalito al si ekstremajn: „Romano de San Michele”

de Axel Munthe, en kiu la lerta tradukintino Jenny Weleminsky, kvankam obeante la lingvajn regulojn, tamen sukcesis prezenti verkon kun facila kaj bela stilo, ne ĝenante la legantojn per rigidaj naciaj formoj. „La strato de l'Fiŝanta Kato” de Jolanta Földes, kies tradukintoj Ladislaoj Halka kaj Spierer prezentas al ni verkon kun amaso da evidente naciaj formoj, kiuj sendube havigas specialan ĉarmon al la originalo, sed en Esperanto aspektas tamen kvazaŭ tradukoj faritaj de elementkursano. Konklude: la nacia ĉarmo de iu parolturno kaŝiĝas ne ekskluzive en la ekstera aspekto de tiu formo, sed en ĝiaj aspekto kaj spirito kune; laŭvorte tradukita tia formo aperas en Esperanto ofte kiel monstraĵo, sed tradukita laŭ la spirito de Esperanto tia formo konservas sian ĉarmon kaj pliriĉigas la lingvon. Nur en tia tradukado konsistas vera arto; la unue nomita ne estas tradukarto, ĝi estas transmetado de vortoj. Pro sia kvazaŭ aŭtoritata pozicio L.M. rikoltis kun laŭdoj nur malofte malaprobos. Se la kompetentaj aŭtoroj ĉirkaŭ L.M. metus sin pli ĝuste inter ol super la esperantistaron, ili sendube akirus pli ĝustan komprenon pri tio, kion ĝi sentas, sed ofte ne kuraĝas esprimi pro troa respekto al la superkompetenteco. Kaj se L.M. ne rigardus ĉiun sian kunlaboranton jam pro tio spertulo, sed eduke gvidus la kunlaborantaron en direkto al lingva perfektigo, ĝi rikoltus laŭdojn ne nur buŝajn, sed sincere sentitajn.

Men vraagt ons:

Is *atendinte* als vertaling van *onverwachts* goed gebruikt in de vertaling van: *Onverwachts ontmoette ik hem?* Is *neatendinte* te beschouwen als een beknopte bijzin met de betekenis: *terwijl ik hem niet verwacht had?* Is *neatendite* be-
slislist foutief?

In genoemde zin heeft *onverwachts* werkelijk de betekenis: *terwijl ik hem niet verwacht had*, zodat de vertaling door *neatendinte* de meest correcte is. *Neatendite* is beslist foutief! Met *neatendite* zou de zin een andere betekenis krijgen, n.l.: *terwijl ik niet verwacht was*.

Een dergelijke veelvuldig gemaakte fout is: *enfermite* mi sendas al vi, wat moet zijn: *enfermite* (ingesloten *hebbende*) of: *enfermita*, als bepaling van gesteldheid. *Enfermite* zou immers zijn: *ingesloten zijnde*.

Redakcia korespondo.

Al sro W. B. en Llandudno: Ni tre dankas vin pro via afabla atentigo kun detalaj argumentoj. Ni tamen ne tuj korektos, sed tuŝos la koncernatan temon en unu el la proksimaj numeroj, ĉar ĝi indas iom detalan pritrakton.

Pri la uzado de *tiel* kaj *kiel* ni ne samopinias kun vi; ni jam pruvis, ke eĉ Zamenhof ne konsekvence uzis tiujn vortojn.

Kaj pri L. K. vi pravas: kiom da kapoj, tiom da opinioj, kio niaopinie tamen ne rajtigas iun membron persvade trudi al ni sian opinion, klopodante moki aliies koncepton pri plejeble logika uzado. Tuj kiam eble ni detale respondos vian leteron kun estimo nian sinceran saluton!

Al sro M. V. J. en M.: La temon tuŝitan de vi ni traktis detale en la rubriko „Men vraagt ons”, por ke ĝi utilu ankaŭ al niaj studentaj legantoj. Cetere, en ĉio ni samopinias kun vi. Super ĉio validas la logiko, kaj se pri kio ajn ni permesas (ne rekomendas!) formon ne pure logikan, tion kaŭzas la fakto, ke, kiom ajn genia nia lingvo estas, ĝi estas produkto de homa laboro, do neperfekta. Sed, se iel eble, ni kondamnas nelogikajn formojn uzatajn senbezone, kiel *pluen* kaj *plue* (en *plue labori*).

Al kdo Ph. R. en A.: Pro okupiteco ni devis ĝis nun prokrasti respondon al via letero. Tamen ĝi venos! Volonte ni diros al vi nian opinion.

Inhoud:

Cu dialektoj en Esperanto estu permeseblaj?.....	17
Cu Esperanto bezonas ankoraŭ ion?	33
Diskutoj pri la logiko	49
Esperanto en la ĉiutaga vivo. <i>H. Velthove.</i> 6, 22, 37, 60, 90, 105,	123
Esperanto 50-jara 10, 29, 46, 62, 78, 93, 106, 124, 141, 155, 172,	188
Fundamento de Esperanto. <i>G. P. de Bruin</i>	134
Handleiding bij het vertalen. <i>F. Faulhaber.</i> 9, 25, 43, 55, 86, 104,	121, 136
Het eerste Esperanto-examen in Nederland (1909). <i>G. P. de Bruin</i>	119
Hoe kan ik het in Esperanto zeggen?	28, 56
Kiel ni rilatu al ekzemploj de Zamenhof?	145
Kion ni ne lernas per regulo, tion ni atingos per formulo 3, 19, 34,	69, 118, 151
Kun ruĝa krajono tra la literaturo. <i>Th. Buis.</i> 12, 44, 77, 94, 110,	143, 175
Logiko kaj reakcio kontraŭlogika	129
Malsana kuracisto	97
Onze literatuur: <i>Luno de Izrael</i> 31, <i>Rigardante malantaŭen</i> 61,	<i>Marta</i> 92.
Onze nieuwe taak	1
Pli da akordo inter la Lingva-Komitatanoj! <i>F. F.</i>	65, 161, 177
Por Komencantoj. <i>H. van Lier.</i> 2, 18, 35, 50, 67, 82, 99, 114, 131,	146, 163, 178
Por Progresantoj 14, 26, 40, 57, 74, 87, 108, 126, 138, 158, 170, 186	
Provalu la memoron! <i>Jac. Lem.</i> 5, 21, 36, 51, 68, 83, 101, 116,	133, 148, 164, 179, 113
P.V. diras, ke....	113
Recenzo kun vosto	81
Wat er aan haperde.... <i>G. P. de Bruin.</i> 7, 23, 38, 53, 71, 84,	192, 150, 166, 181

Men vraagt ons:

accusatief na anstataŭ 42, alleen 21, alle-al de 59, ante-inte 122, as-is 56, as-is na inte 52, batali po du-batali po viro 80, bepaling van gesteldheid 100, bijklemtoon 157, ĉu-kiam 76, delogi-tenti 1337, demandi iun-demandi al iu 149, domoj de homoj-homaj domoj 52, enkelvoud of meervoud 153, esceptite-escepte de 59, estingi 42, estu vokataj 64 140, franca-francia 89, freti-freto 123, gastigi-gastigo-gastameco 165, geld wisselen 112, glitigeco, glateco 117, igi fariĝi 42, imagi (sin) 137, iri al la lito-enlitigi 122, jakurto-jogurto 96, jen kaj jen 30, kelke da tiaj-kelke de tiaj 144, kiome, kiom 96, k-kaj 122, komenco-komenciĝo 53, komforte-intime 85, koppelwerkwoorden 182, krediti-debeti 96 143, laberdano-labardano 103 132, lerneje 72, lia-sia 184, li skribis, ke li venos -li skribis, ke li venas 128, loĝata 96, mala ol-mala al 153, malfrue-malfrua 100, malmatura-nematura, malsaniga-nesaniga 76, memkono, memfido, memamo 128, mortinto-mortigito-mortiginto 34, naamvallen 144, onbepaalde wijs na ŝajni 89-122, ontrollen 85, onverwachts 180, 191, opinii-trovi 64, overgankelijke werkwoorden 21, pezilo-pesilo 16, plie-plue 182, rezulto-rezultato 60, richtings-n 52, sekvontan-sekvantan 96, senkulpeco-senkulpo, senkulpigeco-senkulpigo 100, senpage 16, sen voor onbepaalde wijs 100, sole-sola 30, suĉi polvon 70, supozi-konjektivi 147, surmetis-estis surmetinta 96, surtere-enakve 96, ŝajnas esti-ŝajnas fariĝi 70, ŝia-sia 107, tajgo, pimplo, sinamonurso, fretisto, leadro 112, tiomekiome 80, transporta rimedo-transportilo 117, trovi necesa-trovi necese 117, unuopa-unuope 16, vertalingen 59 85 117 118, voĉlegi-laŭtleĝi 70, zaak na antecedent 169.

